


AMERIKA ESPERANTISTO

# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE



*Feliĉan  
Novan Jaron*

*Broadcast by Voice of America*

*"La Dankema Leono" – Humoraĵo*

*This English Language of Ours*

*"Novjaraj Rezolucioj" – Studo*

*Esperanto-Domo & Cseh-Metodo*

**JAN - FEB  
1964**



## AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.  
1837 N. E. 49th Ave., Portland 13, Oregon

Central Office: Doris T. Connor, George Alan Connor (see address above)  
Esperanto Book Service, Williamsburg P. O. Box 315, Brooklyn 11, N. Y.  
Sustaining Board: Ralph H. Beard, Anonymous, Chas. C. Cummingsmith,  
Edwin R. Fleming, Dr. Lee-Min Han, Austin Herschel, Allan Hutcheon,  
J. Archie Johnson, Jr., Juan Jova, Paul J. Kovar, Charles A. Lyon, Bertha  
E. Mullin, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan, Virgil Whanger.

---

### LA DANKEMA LEONO – Humoraĵo el “La Brazilia Esperantisto”

Tradukis Edilia de Miranda

En afrika arbaro, juna leŭtenanto trankvile piediris, absorbita en siaj pensoj. Lia atento estis subite altirita al sono de profunda ĝemo. Ĉar lia sciema vekigis, li rapidigis siajn paŝojn, kaj direktante ilin al la ĝemoj, alvenis apud piendanta leono kuŝanta sur la tero en tre suferanta stato.

Li eksentis grandan kompaton al la besto, kaj demandis:

“Kio okazis al vi?”

La malfeliĉa besto, per paroloj interrompita de ĝemoj, kun granda malfacileco, rakontis ke malbona pikilo internigis en unu el ĝiaj antaŭaj piedoj, kaŭzante al ĝi kruelegan doloron.

La leŭtenanto pretigis eltiri la pikilon, kion la suferanta besto akceptis. La kompatema junulo sukcesis je la operacio, kaj la nun sendolora besto esprimis sian dankemon per koregaj vortoj, finante tiel ĝian dankan paroladon:

“Mi volas pagi servon per servo, kaj tuj kiam mi havos la okazon, mi montros al vi mian dankemon.”

Poste ili reciproke adiaŭis kaj disiĝis. Post kelkaj tagoj la juna leŭtenanto, kuŝanta sur sia lito, atente legis gazetojn de sia patrujo, kiam li aŭdis bruon ekster sia tendo. Li levigis kaj iris al la pordo; tie staris la leono, al kiu li iam faris servon.

“Kara amiko, la dezirita okazo montri mian dankon per ago fine alvenis.”

“Kiel?” nekredeme demandis la leŭtenanto.

“Mi sukcesis altigi vian militistan rangon.”

“Kiamaniere vi atingis tion?” demandis la mirigita militisto.

“Mi manĝis la kapitanon!”

---

Sur la kovrilo: Doris Tappan Connor, helpita de S-ro Connor, gvidas en Portlando Cseh-kurson per la Cseh-metodo. Vidu paĝojn 9-11.

---

*“The Association will not knowingly admit as members persons who are Communists or Fascists or others who seek to overthrow the Government of, or in the interests of a foreign power seek to weaken, the United States, or to change its form of government by other than constitutional means.” – EANA Constitution.*

Subscription \$5, Single copy 50¢, Library sub. \$2.50.

Jarabono eksterlande por kalendara jaro: \$2.50 aŭ egalvaloro.

Gratis to Members of the EANA.

Regular Membership in EANA – \$5.00 per year. Patron – \$10.00.

Elementary or H.S. Students under 18 years – \$4.00 per year.

Sustaining Board – \$3.00 or more per month.

# AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 76

JANUARY-FEBRUARY 1964

Nos. 1-2

## VOICE OF AMERICA BROADCASTS ABOUT ESPERANTO ON THE JAPANESE RADIO PROGRAM, OCTOBER 28, 1963

Kiyotaro Deguchi and Yoshimi Umeda, of Kameoka, Japan, were interviewed about their trip around the world and their attendance at the World Esperanto Congress in Sofia, Bulgaria, in August. Mr. Deguchi is a representative of the Japanese Esperanto Institute, while Mr. Umeda is the Chairman of the Esperanto Youth Organization in Japan. They explained that the Universal Esperanto Association, with headquarters in Rotterdam, holds an annual congress and that the 1965 congress is scheduled to be held in Tokyo. The World Esperanto Congress in Sofia, the 48th, was attended by 3,500 persons from 45 nations. There were six Japanese among them. Mr. Deguchi and Mr. Umeda enjoyed it tremendously because there was no need for translators or interpreters. Everyone spoke Esperanto. They said that the number of people speaking Esperanto is especially large in England, the Netherlands, France, the Scandinavian countries, and in some of the republics of Latin America. In Japan there are about 100,000 persons who know Esperanto. This is the highest number in any of the Asian nations.

Mr. Deguchi and Mr. Umeda also described how the use of Esperanto helped them on their trip around the world. Members of the Esperanto movement wear a green star, so that any Esperantists may know that they can talk to them in the language if they want to. While traveling all over Europe for a period of three months, the Japanese travelers experienced no language difficulties because they used Esperanto everywhere. They did not stay in hotels, but in the homes of people who knew Esperanto. In Japan, where Esperanto became first known about 60 years ago, there is now increased interest in the international auxiliary language because of the World Esperanto Congress to be held in Tokyo in 1965.

In discussing the Sofia Esperanto Congress and Esperanto meetings in general, Mr. Deguchi and Mr. Umeda said that the emphasis was on culture and art and that the discussion of politics and ideological subjects was avoided. In many Esperanto organizations there is a rule that there shall be no political controversy. At the Sofia Congress, the Japanese participants had an opportunity to demonstrate Japanese culture and art. Esperanto literature includes translations of many books not available in other languages, including English or Japanese. Unfortunately, the visitors said, many Esperanto books are rather expensive, because their circulation is limited.

Mr. Deguchi and Mr. Umeda are members of a movement called Oomoto. This Japanese religious group has been using Esperanto in its international contacts, they said.

In preparing the World Esperanto Congress in Tokyo, organizers pay much attention to the problem of accommodations. It is hoped that many visitors from abroad will be housed in private homes rather than hotels.

# THIS ENGLISH LANGUAGE OF OURS

*William Solzbacher*

On my first trip to England, more than twenty years ago, I spent a few days with a family in which one of the girls was a beginning geography teacher. She subscribed to the American "National Geographic Magazine" and told me that she was very fond of its articles and magnificent illustrations. Then, suddenly, she added with a sigh: "It's supposed to be printed in English, but sometimes I wonder."

According to George Bernard Shaw, England and America are "two countries divided by the same language." Of course, the language is "the same" in a broad sense. But when English-speaking people from opposite shores of the Atlantic have to work closely together in some particular field, an artificial, standardized "Inter-English" has to be agreed upon as a common auxiliary language. Such was the case in the North African campaign, for instance, when the British Army made a concession by accepting the American word "gasoline" instead of its own word "petrol" while the Americans agreed to call their trucks "lorries", in accordance with the British "dialect" of the English language.

"The Outpost," a lively newsletter published by Americans in Britain, has printed an interesting little article on some of the troubles created by the differences between our English and theirs. Here it is:

We have long been aware of a need for an international or Basic English vocabulary which both British and American educators could understand, since professional jargon in the two countries is now so different that a British school-teacher can make neither head nor tail of an American book on education, nor an American teacher of a British. The British are bewildered by reference to eight or twelve grades and an alphabetical grading system; they cannot understand the difference between Junior High School and a Junior in High School, or Junior College and a Junior in College. They hear about valedictorians, saluatorians, sophomores, sororities, fraternities, cheer-leaders, pep sessions. Americans are equally puzzled by references to forms or the equivalent standards in council schools, to head-boys and head-girls, monitors and prefects, by discussions of "Matric" or "School Certificate" or "Higher School Certificate" examinations. They are unfamiliar with the use of the word "infant" to mean a kindergartener, or of "junior" to mean a child in the seven to eleven age group.

But although we have taken the divergence in educational language for granted we have not realized that even in the field of science the differences are now so marked that a scientist on this side of the ocean may have difficulty in understanding an article written by an American. An expert in animal breeding tells us that in reading American periodicals he has often been puzzled by unfamiliar terms or usages. A "barn" in England is a building in which animal foodstuffs are kept, not a building in which the animals themselves are housed. In England cows are housed in cow-sheds; in Scotland, in byres. The phrase, "to freshen" meaning "to calve" has puzzled many an English reader; so have the American uses of the words "corn," which in England means any kind of grain, "hog," which in England is the equivalent of the American "barrow," a term entirely unknown on this side. Americans keep "chickens," the British keep "fowls," and the word "chickens" is used to refer only to very young chicks or to what people had for dinner in the days before all the —'s got eaten up.

More serious than all these differences are the differences in measurements,

e.g. tons, and in the meaning of such words as billion. When a scientist reads an article stating that tests have proved the existence of so many billion what-nots, the poor man has to find out where the article was written before he knows how many noughts (zeros to us) to put into the figure.

Professor Mario A. Pei, in his "The World's Chief Languages", gives about six pages of examples, showing the difference in American and British English, as well as many more pages on other brands of English, spoken in Canada, Australia, New Zealand, South Africa, India, etc. Here are, for instance, differences in the vocabulary relating to transportation (page 68 of Professor Pei's book):

<i>American</i>	<i>British</i>	<i>American</i>	<i>British</i>
information bureau	inquiry office	top (car)	hood
ticket agent	booking clerk	hood	bonnet
conductor	guard	fender	wing
right of way	permanent way	gas, gasoline	petrol
freight car	goods waggon	rumble seat	dickey
ties	sleepers	spark plug	sparking plug
sleeper	sleeping car	storage battery	accumulator
tracks	metals	windshield	windscreen
all aboard!	take your seats!	muffler	silencer
gangway! one side!	by your leave!	gear shift	gear lever
on time	to time	sedan	saloon car
street-car	tram	parking-place	car-park
subway	underground	truck	lorry
underpass	subway	dirt road	unmetalled road
comfort station	public convenience	traffic jam	traffic block

Instead of engaging in the hopeless endeavor of making English the "world language", one might well suggest that there is a very real need for an intelligent effort to make the English-speaking peoples understand one another.

**SSgt. James C. Faughnan**, Hawaii, Patron Member of EANA since he first joined in 1952, sent us a review of the book "You English Words", by John Moore, Lippincott, from which we select "gems" which in some measure supplement the foregoing article. In rural England, "giddling" (*flighty*) girls "boyled" (*romped inelegantly*) with the boys. And "dowt the blizzy" was to "put out the fire". "Quockerwodger" which once meant a wooden figure that jerked its limbs about when pulled by a string, 100 years ago, came to mean a politician acting under an outsider's order. The author says the word "is now obsolete, but the politician isn't." Then there are words invented by notable people: Lewis Carroll's "chortle", Thomas Huxley's "agnostic", Horace Walpole's "serendipity", etc. And words which stem from people's names: *boycott*, *guillotine*, *hansom*, *bloomer*, *silhouette*, *shrapnel*. And words whose origins are still totally mysterious: *lad*, *lass*, *big*, *bad*, *pun*, *blight*, *slum*. Your editor of AE, on his first trip to England, asked where he could get a shoe-shine. He learned that in Merry England shoes are "boots", that shine is "polish" (pronounced "pole-ish"), and that the place to get your "boots pole-ished" was outside your room door in your hotel, at night while you slept.

## ESPERANTO IN ACTION AROUND THE WORLD



*In Maceió*, capital of the Brazilian State of Alagoas, a new apartment building is named *Edifício Esperanto* ("Esperanto Building").

*A famous book about Dr. L. L. Zamenhof*, author of Esperanto, written by Dr. Edmond Privat, who was Professor of English Literature at the University of Neuchâtel, Switzerland, appeared in a fairly large number of languages, including English. The Dutch version is entitled *Tragediek en Triomf van Zamenhof* (The Tragedy and Triumph of Zamenhof). The book was originally written in Esperanto.

*A Catholic Bishop in Czechoslovakia*, who died in 1961, not only spoke Esperanto fluently, but placed the Esperanto emblem, the Green Star, into his episcopal coat-of-arms, when the Pope appointed him Titular Bishop of Zephyrium and Auxiliary Bishop of Prague in 1933. The Most Reverend Dr. Antonin Eltschkner was the President of the Catholic Esperanto Association in Czechoslovakia, when such organizations were still permitted. He preached many sermons in Esperanto and used the language in speeches and radio programs as well as in travel and correspondence. He died at the age of 80.

*A Member of the French National Assembly*, N. Pavot, described Esperanto as "a necessary tool of foreign travel," when he addressed a regional Esperanto conference at Caudry, Northern France.

*In the Far East* modern Esperanto dictionaries have been published in a number of countries. A 234-page Esperanto-Indonesian Dictionary, by Hasan Basri and Liong Soen Kiat, appeared at Medan, on the island of Sumatra (Indonesia), a voluminous Esperanto Vietnamese Dictionary at Hanoi (Communist North Viet-Nam). Japan has had for many years some of the best Esperanto dictionaries existing anywhere.

*"Tales Told by a Squirrel"* is a booklet for children published in Sligo, Ireland. A remarkable fact about these "wee stories for young folk", by Minnie Mitchelson Goodall, is that they were originally written in Esperanto for an Esperanto magazine. Mrs. Goodall died in 1953. Her husband made the translation from Esperanto into English.

*An Esperanto translation service* for competent translations from English into Esperanto or from Esperanto into English has been established in North America under the name "*Interparl.*" It is equipped to handle resumes, letters, articles, books, etc., whether technical, commercial, literary, or other. See announcement on "Dez. Kor." page.

*Icelandic historical documents*, old and new, appeared in Esperanto translation in the Reykjavík magazine *Voĉo de Islando*. Stories from the *Landnámabók*, describing the settlement of Iceland by Vikings from Norway, were serialized. The book probably dates back to the 12th century.

## LA ESPERANTO-STUDANTO

### New Year Resolutions

(Two fellows are talking.)

*Adam.* My wife's a scream. She's always thinking up New Year resolutions.

*Karl.* And you, Adam, aren't you doing the same?

*Adam.* Not me! Not on your life! I've still got some from last year hardly used!

*Karl.* What's this? (*he picks up a long paper from the table*) It looks like a list of New Year Resolutions. Maggie, your wife, wrote them. Listen! Number one: "To stop boring people with old jokes badly told."

*Adam.* What joyous news for me! What's next?

*Karl.* Number two: "Never be late for appointments."

*Adam.* Oh, life will be wonderful if she keeps up to this.

*Karl.* Number three: "To be careful of personal spending and to save more money each week."

*Adam.* That is absolutely marvelous! Maggie would be the perfect wife with all those virtues.

*Karl.* Number four: "To work hard in the garden and to make it the most beautiful one in the city." And now listen! The next two will really make you roar!

*Adam.* Now, don't tell me Maggie's resolved not to gossip with her friends anymore.

*Karl.* No, my boy, even more interesting. "To resolve not to smoke or gamble or stay out late with the boys."

*Adam.* WHAT! But Maggie doesn't smoke or gamble or stay out with the boys!

*Maggie.* (*coming in*) Of course, Silly, I don't but YOU do! And that's a list of New Year Resolutions for YOU! My resolution is to make you keep yours!

### Novjaraj Rezolucioj

(Du sinjoroj parolas.)

*Adamo.* Mia edzino estas tre komika. Ŝi konstante elpensas novjarajn rezoluciojn.

*Karlo.* Kaj vi, Adamo, ĉu vi ne faras same?

*Adamo.* Ne mi! Absolute ne! Restas ankoraŭ kelkaj de pasinta jaro preskaŭ ne uzitaj!

*Karlo.* Jen kio? (*li prenas longan paperon de la tablo*) Aspektas kiel listo de novjaraj rezolucioj. Skribis ilin Manjo, via edzino. Aŭskultu! Numero unu: "Ĉesi tedi personojn pri malnovaj ŝercoj fuŝe rakontitaj!"

*Adamo.* Kia ĝoja novaĵo por mi! Kio sekvas?

*Karlo.* Numero du: "Neniam esti malfrue por rendezuoj."

*Adamo.* Ho, la vivo estos belega, se ŝi vere atentos pri tio.

*Karlo.* Numero tri: "Esti zorgema pri personaj elspezoj, kaj ŝpari pli da mono ĉiusemajne."

*Adamo.* Tio estas absolute mirinda! Manjo estus perfekta edzino kun ĉiuj tiuj virtoj.

*Karlo.* Numero kvar: "Labori diligente en la ĝardeno, kaj fari el ĝi la plej belan lokon en la urbo." Kaj jen aŭskultu! La du sekvantaj vere amuzegas vin!

*Adamo.* Nu, ne diru al mi, ke mia Manjo decidis ne plu klaĉi kun siaj amikinoj.

*Karlo.* Ne, junulo, eĉ pli interese "Decidi ne plu fumi aŭ vetludi aŭ resti malfrue for de la hejmo kun la kunuloj."

*Adamo.* KIO! Sed Manjo ne fumas aŭ vetludas aŭ restas for kun la kunuloj!

*Manjo.* (*envenas*) Kompreneble, stultulo, ne mi sed VI ja faras tion! Kaj tio estas listo de novjaraj rezolucioj por VI! Mia rezolucio estas: devigi vin plenumi viajn!

— D. T. C.



**The Central Office of EANA** is now in order for the "year of solid achievement, 1964" which was predicted in the Nov-Dec 1963 issue. In that issue, we stated that "repairs and installations were practically completed" re the new Esperanto-Domo, following the big removal job from New York. One major operation was carried into the first two weeks of January, namely the insulation against winter cold and summer heat, of the entire second floor, which is devoted entirely to our Esperanto work. This insulation job necessitated moving furniture and equipment into temporary storage in other parts of the house, thus bringing a halt to most of our Esperanto operations. We are now happy to report that all is again in place and in order, after the few weeks of displacement, and that the insulation job is the *very last major operation* required on this old but otherwise very adequate structure for "headquarters."

**How you can help in advancement** toward effective work for Esperanto, now that a solid year is ahead for all of us. Perhaps our statement in the Nov-Dec 1963 issue merits repetition, pointing the way to progress. "We earnestly seek your active participation and assistance. *YOU* can greatly aid in the work ahead by re-dedicating yourself to our common endeavors for the promotion of Esperanto, by securing new members, by sending in your renewal as early as possible, by rejoining as Patron or Sustaining Member, by sending in your donations and contributions, and finally by aiding efforts for renewed *unity* for all rational Esperanto elements in America, through membership in EANA for concerted promotion of Esperanto." *NOW* is the time for your renewal and support.

**We are planning a Special Bulletin**, in addition to regular issues of AE, to seek out Esperantists and Members who will form an *Advisory Executive Committee* to actively advise and actively execute measures for the betterment of the Association and AE. Such a Committee, in as large a number as possible, is needed to assist the Estraro and the Central Office in the manifold needs of the Esperanto movement in America. Such a Committee should elect its own secretaries. It should be free from any dictation from the Central Office as to its proposals and resolutions, and the officers of the Association should give priority to its considered advice and counsel. Possibly a few general principles, based upon the advices of Zamenhof, might serve as a code of guidance for this Committee. The Committee should have the utmost possible freedom of decision and operation. Such a Committee might make of the Association and AE a powerful organization for Esperanto progress in America. There are matters of policy, and organization, for the Association. There are matters of content and general betterment, for the AE. There are matters re Esperanto classes, publicity, promotional materials, congress arrangements, etc, all of which might be tremendously improved. A list of those elected from the membership, by the Committee, should be printed regularly in AE. If you wish to assist by aiding the formation of the Committee, either as a *member of same* or *individually*, you may write the Central Office at any time now. All names will be given to the eventual Committee. This proposal for *Esperanto group endeavor* is in all sincerity.



# INTERNACIA INSTITUTO DE ESPERANTO

## CSEH-METODO DE ESPERANTO-INSTRUO

*William Solzbacher*

La jena priskribo de D-ro Solzbacher pri vizito al la fonto de inspiro kaj instruo por gvidantoj de Cseh-kursoj, kiuj spertiĝis pri la mirinde sukcesa Cseh-metodo, donas komprenon pri la fama Esperanto-Domo en Arnhem, antaŭ la milito. Andreo Cseh, la genia estro de la Internacia Esperanto-Instituto kaj la kreanto de la tre sukcesa Cseh-metodo, nun deforas ĉe la Instituto en Den Haag, kie la Universala Ligo ankaŭ funkcias. Andreo Cseh kaj Julia Isbrücker kunlaboris en multaj servoj al Esperanto dum la jaroj, kaj ili meritas la plej fervoran dankon pro tio. Multaj gvidantoj de Cseh-kursoj tra la mondo, uzante la Cseh-metodon de instruo, lernis tiun metodon sub la lerta instruo de Andreo Cseh. Inter tiuj plej spertaj kaj sukcesaj gvidantoj de la Cseh-kurso estas Doris Tappan Connor, unu el la sekretarioj de EANA. Vidu foton sur la kovrilo de ĉi tiu numero de AE, pri S-ino Connor gvidanta Cseh-kurson helpita de S-ro Connor, kiu ankaŭ studis en la Esperanto-Domo.

La nederlanda urbo Arnhem, kiu en Septembro 1944 estis centro de unu el la plej furiozaj bataloj en la milito, estas konata al la Esperantistoj en la tuta mondo kiel urbo de la Esperanto-Domo, kie la Internacia Cseh-Instituto organizis siajn kursojn por gvidantoj de Cseh-kursoj kaj kie miloj da personoj pasigis agrablan libertempon en tute Esperantista atmosfero. Kiam la radio-raportoj kaj la ĵurnaloj parolis pri la sanga batalo de Arnhem, ni ĉiuj timis pri la sorto de tiu gastema domo, kiu troviĝas iom ekster la urbo en bela parko. Ĉu bomboj kaj grenadoj detruis ĝin? Ĉu oni batalis inter la arboj, kiuj ĉirkaŭas ĝin? Ĉu ni iam retrovos ĝin en ĝia tuta alloga beleco kaj Esperantista ĉarmo?

Mi vizitis la Esperanto-Domon nur unufoje, en Septembro 1931. Mi venis de internacia konferenco en Lunteren, Nederlando, kaj estis survoje al internacia ekspozicio en Bruselo, Belgujo. Mi propo-

nis al amiko, kiu ankaŭ iris de Lunteren al Bruselo, ke ni faru la vojaĝon kune. Mi deziris pro speciala kaŭzo, ke li vizitu la Esperanto-Domon. Li estis estro de asocio, kiu organizis vesperajn kursojn. Esperanto estis unu el la lingvoj, kiujn oni instruis tie. Mia amiko estis konvinkita pri la neceseco de la Interlingvo kaj povis legi ĝin, sed li ne aktive partoprenis en la Esperanto-movado. Lia intereso estis tute praktika. Mi parolis al li pri la Cseh-metodo de Esperanto-instruado kaj pri la Cseh-Instituto, rekomendante ke li havigu al si eksterlandan Esperanto-instruiston aŭ instruiston kiel eble plej ekzotikan. La ĵurnaloj en lia urbo kaj la publiko parolus pri la eksterlanda instruisto kaj la Cseh-metodo, kaj, se ĉio estus bone organizata, tio povus esti bonega propagando, ne nur por Esperanto, sed ankaŭ por lia asocio kaj liaj vesperaj kursoj. La ideo plaĉis al mia amiko kaj li plezure konsentis iri al Arnhem

kaj diskuti la detalojn kun Pastro Andreo Cseh. Ni eĉ havis la kaŝan esperon, ke ni eble povus instigi Pastron Cseh persone, ke li donu la kurson.

La vetero estis bela, ne tro varma kaj ne tro malvarma. Ni do decidis iri piede al la Esperanto-Domo. Ni promenis tra la ordaj kaj puraj stratoj de Arnhem — ĉio estas orda kaj pura en Nederlando — kaj eniris la urban informoficejon por turistoj. Fraŭlino ĝentile klarigis al ni la vojon. Ni vere ne estus bezonintaj ŝian helpon, ĉar ni trovis, ke vojmontriloj indikantaj la direkton troviĝis en multaj lokoj. Estis klare, ke la Urbo Arnhem konsideris la Esperanto-Domon grava.

Sed unue ni trovis alian Esperantistan institucion: Je la rando de la strato, proksime al rivereto, altiris nian atenton durada kovrita ĉaro. Kvinpinta verda stelo estis pentrita sur ĝin. Vidante mian verdan stelon junulo en iom fantazia kostumo tuj komencis klarigi al ni, ke la ĉaro estas lia domo kaj ke li estas vojaĝanta ĉirkaŭ la mondon per Esperanto. Survoje li disdonas flugfoliojn, vizitas ĉiujn Esperantistojn, kies adresojn li povas havigi al si, kaj — vendas poŝtkartojn kun siaj bildo kaj biografio. Kiom da tiaj "mondvojaĝantoj" mi renkontis en mia Esperantista vivo! Mi ĉiam havis iom miksitajn sentojn pri ili. Ili certe altiras intereson al Esperanto kaj kelkfoje varbas novajn anojn al la movado. Aliflan-

ke ili helpas krei la impreson, ke Esperantistoj estas stranguloj, iom frenezaj kaj nenormalaj homoj, kaj ke Esperanto estas lingvo por vagantoj kaj fanatikuloj diversspecaj. La fakto, ke ili vivas el la poŝoj de la Esperantistoj, faras ilin kelkfoje veraj parazitaj, kiuj malutilas al la afero.

Diskutante la bonajn kaj malbonajn aspektojn de Esperanto-propagando per tiaj primitivaj kaj romantikaj "mondvojaĝantoj", mia amiko kaj mi atingis la Esperanto-Domon. La kontrasto estis granda. Mia amiko estis videble impresita per la fakto, ke tio estis solida, serioza, bone organizita institucio. Oni parolis ĉiam Esperante, ne nur en la kurso, sed ankaŭ dum la manĝado kaj dum privata interparolado. La domo estis tute plena, ĉar estis la tempo de grava kurso por Cseh-instruitoj. Pastro Cseh kaj Sinjorino Isbrücker, fondintino kaj direktorino de la Cseh-Instituto, salutis nin varme. Ni tuj partoprenis en unu el la kurskunvenoj, kie ni admiris la talenton de Andreo Cseh kaj de Sinjoro Pragano, kiu estis lia helpanto en tiu okazo.

Estas vere — mi ne deziras silenti pri tio —, ke en la parko mi aŭdis kelkajn personojn interparoli nederlandlingve. Sed antaŭ ol komenci, ili ŝtele ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ ili farus ion treege malbonan. Ili sciis, ke ili pekos kontraŭ la neskribita leĝo de tiu loko, kie Esperanto estis oficiala.

La Esperanto-Domo estis donita

senpage al la Cseh-Instituto de la Urbo Arnhem, en 1929, se mi ne eraras. Ĝia riparo kaj subteno kostis multe da mono, kaj Ĝesinjoroj Isbrücker meritas la dankon de la Esperantistaro pro ilia malavareco. Devus ekzisti en la mondo multe da similaj domoj kun tute internacia kaj Esperantista atmosfero. Ilia rolo povus esti tre granda por la bona funkciado de la Esperanto-movado kaj la fina venko de la Zamenhofa lingvo kiel oficiala helpa lingvo en la internacia vivo.

Mi pensis pri la Esperanto-Domo en Arnhem, kiam mi legis antaŭ nelonge interesan artikolon de John Weighman (pri "La Lingva Problemo") en la hispanlingva revuo "Revista Belga" (Bega Oficejo por Latin-Ameriko, New York, Julio 1944). John Weighman, kiu estas angla specialisto pri franca literaturo, komence ŝajnas esti simpatia al Esperanto, kiun li prave konsideras kiel la sola serioza propono por la solvo de la Interlingva problemo. Fine li tamen venas al negativa konkludo, dirante ke oni devos daŭrigi lerni multajn naciajn lingvojn. Kial? John Weighman diras: "Esperanto devus komence esti uzata kiel helpa lingvo kaj tial havus en la cerbo de ĉiu persono ekziston malpli vivantan kaj klaran ol la gepatra lingvo. Ekzistas kaŭzoj por dubi, ĉu iu lingvo povas prosperi, se ĝi ne estas la unua kaj komuna lingvo de granda nombro da personoj. Eble la latina lingvo estas bona

ekzemplo por ilustriti. Kiam ĝi estis la baza lingvo de pensantoj kaj poetoj, kiu uzis ĝin, ĝi estis vivanta lingvo. Kiam ĝi estis transformita en helpan esprimilon kaj komencis esti uzata kun nacia lingvo, ĝi malfortiĝis kaj fine malaperis".

Sinjoro Weighman ne estas tute malprava, sed li ne sufiĉe konas la Esperanto-movadon. Estas vere, ke lingvo, kiu estus nur teknika kodo por praktika internacia interkomunikado, ne estus "vivanta" lingvo. Ĉiu lingvo, eĉ Esperanto, bezonas "popolon", kiu uzas ĝin konstante, ĉiutage, por ĉiuj kaj ĉiaj bezonoj. Tiu popolo ne bezonas vivi en unu kompakta regiono, sed povas esti disigita tra la mondo. Kiam Esperanto estos ĝenerale uzata en la internacia vivo, ĝi estos por milionoj da personoj nur praktika instrumento uzota kiam necese. Multaj personoj uzos ĝin nur malofte kaj eble ne tre elegante. Sed centiloj da personoj kaj miloj da oficejoj, kies laboro estas esence internacia, uzos ĝin ĉiutage, ne kiel dua lingvo, sed kiel unua. Por prepari tiun tempon, institucioj kiel la Esperanto-Domo en Arnhem ludas gravan rolon, ne nur kiel centroj por intensa, efika, moderna, grandskala instruado kaj ekzercado de Esperanto-instruistoj, sed ankaŭ kiel vivcentroj de la movado. Se Esperanto volas fariĝi la dua lingvo por ĉiuj, ĝi bezonas kelkajn lokojn, kie ĝi estas la unua lingvo, ne nur en certaj specialaj okazoj, sed ĉiam.

## ESPERANTA KRONIKO

**Interŝanĝo de traduko per korespondo:** Por perfektigi pri tradukado, *Carle Brawner*, Kalifornio, sugestas jene – “Mi sendas al korespondanton en la angla (por kiu mi tenas mian propran Esperantan tradukon). La korespondanto faras por si Esperantan tradukon kaj sendas ĝin al mi. La korespondanto kompreneble same faras kiel mi. Poste ni komparas niajn tradukojn kaj faras sintezon. Treege interesa kaj instrua afero!”

**Montagu C. Butler**, Anglujo, unu el la plej elstaraj Esperantistoj kaj verkistoj en la historio de la movado, havis gravan operacion en hospitalo pasintan aŭtunon. La samideanaro tra la tuta mondo ĝojas, ke li bone resaniĝas. Multaj profitis pro liaj artikoloj kaj libroj.

**S-ino D. B. (Lilio) Fuller**, Mass., honorinda veterano de EANA, estis aktiva pri Esperanto jam dum preskaŭ 60 jaroj, depost sia komenco en 1905. Ŝi partoprenis en la societo en Bostono komence en 1910, kaj ŝi propagandis Esperanton depost tiam je ĉiu oportuno, en leteroj al konatuloj kaj tagjurnaloj eĉ ĝis hodiaŭ. Ŝia somera hejmo en “Martha’s Vineyard” portas la nomon *Feliĉa Penso* super la pordo, kaj en la spirito de tiu devizo ŝi estas jam delonge amata samideanino en la Asocio.

**Chas. C. Cummingsmith, S. M.**, Frato en *Chaminade College*, Hawaio, Direktoro de la Biblioteko, estis grave malsana, almenaŭ provizore, kaj ne nun laboras en la biblioteko. Oni raportas, ke li iom post iom resaniĝas, kaj liaj multaj amikoj tra la mondo ja deziras por li revenon al bona sano. “Karlo” jam dum multaj jaroj estas Kontribuanto al EANA kaj Membro de la Subtena Komitato. Ĉiuj samideanoj bondeziras al li.

**D-ro Daniel da Cruz**, sciencisto en Kolorado, estas tre estimata membro de EANA. Antaŭ lia alveno je ĉi tiu lando, li pasis du jarojn en Mozambiko por studi indigenan etnologion por la portugala registaro. Li verkis libron “Em Terras de Gaza” (En landoj de Gaza) pri siaj spertoj en tiu forta lando. Ni nun estimas lin kiel samideanon en Usono.

**S-ro J. V. Espinoza**, Venezuelo, S. A., bona membro de EANA jam dum dek jaroj, kaj gajninto de nia *Atesto pri Kapableco*, skribis je la morto de Prezidanto Kennedy: “La venezuelaj radio-stacioj anoncis la morton de la usona Prezidanto John Fitzgerald Kennedy, kiu estis viktimo je sovaĝa atenco! Je la nomo de la venezuela popolo kaj de mi mem, b. v. akcepti, vi kaj via laborema popolo, niajn sincerajn kondolencojn pro la tragika forpaso de via Granda Prezidanto.” – *J. V. Espinoza*.

**Bonfaranta kolego en EANA** estas *S-ro Virgil Whanger*, Ohio, jam membro de la Subtena Komitato dum 17 jaroj. Li diversfoje vizitis la oficejon kaj ĉeestis kongresojn de la Asocio. Bona ŝatokupo lia estas la instruo ĉiusabate al knaboskoltoj kaj knabinoskoltoj pri preciza pafado per pafiloj. Tiel li donas instruon kaj plezuron al geskoltoj en du kursoj kaj en aparta “Pafila Klubo por Junuloj”, kion li estras kun du helpantoj. Kompreneble li ankaŭ penas interesigi la gejunulojn pri Esperanto.

**Niaj mortintoj:** *Don W. Pittman*, Vista, Calif, fidela Patrono de EANA dum 20 jaroj, mortis en decembro. *D-ro Edwin L. Robinson*, Bloomfield Kells, Mich., fidela membro de EANA dum 15 jaroj, mortis pasintjare. Ni ilin funebras, kaj kondolencas al la familoj.

**"Esperanto: The World Interlanguage" por blinduloj:** J. Henry Kruse, Jr., Oakland, Calif., sciigis nin, ke li sukcesis instigi al la *Library of Congress* fari unu sonbendon de tiu populara lernolibro por pruntedoni al blindaj legantoj tra Usono. Kiam la tuta verko estas finita kaj preta, ni sciigos vin pri prunteprenaj aranĝoj por blinduloj.

**Unua premio por tradukita poezio:** Ĉe la Universala Kongreso de Esperanto, Sofio Bulgario 1963, en la literaturaj konkursoj, D-ro Julius Balbin, Nov-Jorko, gajnis la unuan premion por tradukita poezio, pro lia bonega traduko en Esperanton de la poemo "Babi Yar", verkita ruse de la nuntempa soveta poeto Jevgenij Jevtuŝenko. "Babi Yar" estas kontraŭantisemitisma poemo pri la suferoj de la judoj. D-ro Balbin naskiĝis en Polando, kaj mem suferis en Nazi-koncentrejoj. Post la milito, li venis al Usono, kie li instruas lingvojn. Li ankaŭ instruas Esperanton, kion li lernis en Polando je aĝo 15-jara. D-ro Balbin estas Prezidanto de la Esperanto-Klubo de Nov-Jorko. Inter aliaj interesoj, li nun studas en postdoktoriĝa studado de lingvistiko ĉe la Universitato Columbia.

**Nia konata membro en Brazilo,** nome Prof. J. B. Mello e Souza, verkis kaj presigis ilustritan, okpaĝan broŝuron pri siaj vojaĝoj en Usono kaj sia ĉeesto ĉe la Universala Kongreso en Washington, D. C., 1910. La bela libreto estas presita en la angla kaj portugala lingvoj. Eble ni iam povos traduki parton Esperante kaj doni recenzon de ĝi.

**Patrona Membro Kenneth H. Morris, Jr.,** Ohio, ricevis stipendion de la franca registaro por iri al Francujo dum la venonta stud-jaro kaj skribi sian doktoran tezon tie. Ni ĉiuj deziras al li grandan sukceson.

**Ni ne devas ne gratuli Veteranojn:** F. M. Goodhue, Charlton, Mass., celebros sian 94-an naskiĝtagon en la printempo ĉi-jare. Ni fieras pri lia multjara samideaneco. — Leila M. Wainman kun ŝia edzo Ervin D. Wainman, Oscala, Fla., celebris sian 60-an datrevenon de geedziĝo, pasintan someron je la 82-a naskiĝtago de S-ino Wainman. Ŝi estas fidela kaj amata membro de EANA jam dum pli ol dudek jaroj. *Gratulojn!*

**Inter niaj honorindaj Veteranoj:** S-ano E. E. Ievins, Minn., estas Esperantisto dum pli ol 50 jaroj. Kaj S-ano Fred E. Hutchins, Conn., estas Esperantisto de la jaro 1906. Vera fideleco al "nia afero"!

**"La Filatelisto" gazeto pri PM:** Ni rimarkas en la Jul-Aug 1963 numero de tiu bonega dumonata gazeto por filatelistoj du artikolojn pri usonaj poŝtmarkoj, verkitajn de nia membro S-ro Robert Bruce (N.J.). Tre kompetente li priskribas ĉiujn detalojn pri la jenaj PM: *Ŝtateco de Nova Meksiko kaj 50a Datreveno pri Ŝtateco de Arizono*. Ni opinias, ke S-ro Bruce regule priskribas PM por "La Filatelisto." Tiu gazeto estas valora por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri PM. Jarabono estas nur 85¢ aŭ la sama en neuzitaj poŝtmarkoj. Anoncoj pri interŝanĝo de PM, PK, korespondo, ktp, estas senpagaj por abonantoj. Sendu vian abonon al: *La Filatelisto, Jules Coste, 1 Place de l'Abbaye, Creteil (Seine), France*.

**James P. Palmer,** Kalifornio, ofte sendas ŝercojn kiuj meritus esti presitaj pro la bonhumoro, kiam spaco en "AE" permesus. Unu mallonga ekzemplo nun estas: "Hotelo en la Rokaj Montoj reklamas — 'Se vi ne povas dormi ĉi tie, la kaŭzo estas via konscienco!'"

- Danlando.* S-ino Karla Jörgensen, Frölundvej 3, *Hammerum*, Danlando.  
 Dez. kor. pri homoj, libereco, literaturo. Prezidanto de la loka biblioteko kaj estrarano de la lernejo. Ĉiuj kiuj skribos ricevos resp.
- Franĉujo.* S-ro Alfred Contart (emerita lernejestro), *Norrent-Fontes* (Pasde-Calais), France. Dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.
- Germanujo.* Hermann Schumm, Gottlieb-Olpp-str. 24, *Teubingen*, Germany. Germana studento serĉas leteramikojn en ĉiuj landoj.
- Japanujo.* S-ro Goun-Ikegami (33-j.), *Hukuokamachi*, Toyama-ken, Japan.  
 Dez. kor. kun ĉiulandaj geinstruistoj kaj gelernantoj pri nova filozofio kaj aliaj temoj per L, PK, PI, interŝ. PM.
- Japanujo.* F-ino Sadako-Okamura, (15-jara), Tamamizu Idecho Tsuzukigun, *Kyoto*, Japan. Dez. kor. kun 13-20-jaraj studentinoj ĉiulande.
- Venezuelo.* Félix Garcia Blázquez, Apartado Altamira 12.930, *Caracas*, Venezuela. Dez. kor. pri lingvoj, inĝenierarto, ŝakludo.
- Usono.* S-ro Joe Dolan, KHJ Radio/TV, 5515 Melrose Ave., *Hollywood*, Calif., USA. Televida komentisto en Televido/Radio, 42-jara, dez. kor. precipe kun profesiaj personoj, proks. samaĝaj, kiuj okupas pri talento kaj komentado, aŭ ĵurnalistoj, verkistoj, programistoj, aktoroj, ktp, kiuj okupas pri Radio/TV, (sed ne teknikistoj). Dez. kor. k.ĉ.l.
- Usono.* S-ro Charles C. Fenner, P.O. Box 43, *Norfolk*, Mass. 02056, USA.  
 Instruisto de komencanta grupo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj ekster Nord-Ameriko.
- Usono.* S-ro John G. Henson, 1220 Elm Ave., *Grand Junction*, Col., USA.  
 Lerneja instruisto deziras korespondi kun geinstruistoj kaj gesamideanoj tra la tuta mondo.

### **Instruisto de Portugala kaj Esperanta Lingvoj Bezonata**

*Portoriko.* Prof. Margaret Roubicek Wimmer, Chairman of the Dept. of Foreign Languages, Inter American University of Puerto Rico, *San Germán*, P.R., jam administris Esperanto-Klubon ĉe la Universitato, kaj ŝi nun deziras dungi regulan instruiston por instrui kaj la Esperantan kaj la portugalan lingvojn en la Universitato, komence 1964-65. Ŝi preferas iun el Brazilo, kiu konas tiun amerikan landon. Jen grava oportuno por Esperantistoj helpi pri la enkonduko de Esperanto en tiun universitaton. Se vi povas iamaniere helpi la gravan klopodon, b.v. skribi rekte al Prof. Wimmer ĉe la adreso supre, aŭ al EANA.

### **100 Etikedoj (Decals) "Learn Esperanto The Easy World Language"**

*Cent Belaj Etikedoj* (Decals) kun la Verda Stelo kaj la vortoj "Learn Esperanto The Easy World Language." Uzu sur fenestroj, aŭtomobiloj, valizoj, ktp. Bonege presitaj, verdaj kaj oraj, 2 ¼" x 4", \$8 afrankitaj.  
 De: *Kanada Esperanto-Fondaĵo*, 362 Soudan Ave., Toronto 7, Ont., Kanado.

### **Sperta Traduka Servo – Esperanta-Angla aŭ Angla-Esperanta**

*INTERPARL*, P.O. Box 213, *Monroeville*, Pennsylvania, USA. Ni tradukas resumojn, leterojn, artikolojn, librojn, de Esperanta en Anglan aŭ Angla en Esperantan. Teknika, komerca aŭ literatura temoj. Po \$3 por ĉiu 100 vortoj, po \$12 por ĉiu 1000 vortoj. Sperta kaj senerara servo.

## POPULAR ESPERANTO BOOKS

*The Esperanto Book Service, official book service of EANA, is fully equipped to supply ALL your book needs. Here are a few titles. Write to the address below for complete book lists. Place all your orders with the "Esperanto Book Service."*

ESPERANTO FOR BEGINNERS, <i>Butler</i> , easiest concise text, 28 p... (8 for \$1)	\$ .15
THE ESPERANTO TEACHER, <i>Stuttard</i> , an excel low-cost textbook, 106 p.....	.50
POPULARA LERNOLIBRO, <i>Kokeny</i> , LEARNER'S AID, <i>Dodge</i> , excel set 2 bks:	
Best easy graded <i>Reader</i> , and <i>English Key &amp; Guide to Grammar</i> , 106 p. SET	.70
ESSENTIAL ESPERANTO, <i>Gething</i> , good new standard textbook, 128 p.. Cloth	1.65
STEP BY STEP IN ESPERANTO, <i>Butler</i> , easy "non-gram. method", 280 p. Cloth	1.85
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE, <i>Connor-Solzbacher-Kao</i> , best, "6-bks-in-1", history, textbook, reader, directory, 2 dict. 245 p..... Cloth	3.50
NIXON ESPERANTO VOCABULARY, Eng-Esp & Esp-Eng, beginner dict. 178 p.	.75
EDINBURGH DICTIONARY, Esp-Eng & Eng-Esp, best handy dict. 300 p.. Cloth	1.50
MILLIDGE DICTIONARY, Esperanto-English, best BIG Esp-Eng, 509 p... Cloth	2.50
FULCHER & LONG DICT, English-Esperanto, best BIG Eng-Esp, 352 p.. Cloth	3.35
PLENA VORTARO DE ESP, all-Esp, with 'Suplemento', complete, 584 p.. Cloth	3.35
TALKING YOUR WAY AROUND THE WORLD, <i>Prof. Pei</i> , account in Eng, 224 p.	.50
ONE LANGUAGE FOR THE WORLD, <i>Prof. Pei</i> , "how to achieve it", 307 p.. Cloth	5.00
WORLD'S CHIEF LANGUAGES, <i>Prof. Pei</i> , all langs, incl. Esp. 663 p..... Cloth	6.75
SAY IT IN ESPERANTO, <i>Connor</i> , Eng & Esp, 1000 modern Esp phrases, 160 p.	.75
NAŬLINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO, <i>Bastien</i> , Esp & 8 langs, 334 p.. Cloth	2.35
FUNDAMENTA KRESTOMATIO, <i>Zamenhof</i> , basic Esp vol, 442 p.... Deluxe BD	3.50
LINGVO KAJ VIVO, <i>Waringhien</i> , "Esperantologiaj Eseoj", must, 452 p.... Cloth	4.80
PLANLINGVAJ PROBLEMOJ, <i>Gilbert</i> , compares Esp. with "projects", 100 p..	1.25
ORA LIBRO DE ESP. MOVADO, richly illust. bk of 1st 50 yrs of Esp, 240 p....	1.75
ESPERANTISMO, <i>Braga</i> , Esp miscellany, topics in best Esp style, 32 p.....	.25
VIVO DE ZAMENHOF, <i>Privat</i> , remarkable story of his life, illust, 133 p... Cloth	1.15
LA SANKTA BIBLIO, "The best reader", bound in art vellum, 996 p..... Cloth	2.50
ESPERO INTERNACIA, 240 religious songs, full music notes, 230 p.. Card BD	.75
KARLO, <i>Privat</i> , very popular easy first reader, life of young man, 47 p.....	.30
ESPERANTO-SORTIMENTO, good reading at low cost, 5 books, reg. 30¢ each:	
Akrobato, <i>Blanche</i> , <i>Argenta Akvo</i> , <i>Miserere</i> , <i>Thais</i> , <i>Rozujo</i> , over 200 p.....	1.00
TRI HOMOJ EN BOATO, <i>Jerome</i> , popular, easy, amusing, big novel, 258 p.....	1.50
PROVERBARO ESPERANTA, <i>Zamenhof</i> , with a full analytical index, 167 p....	1.70
MARIA KAJ LA GRUPO, <i>Emba</i> , excel orig novel re Marie & Esp Club, 172 p...	.85
MUZIK-NOTOJ, <i>Bagby &amp; Kalocsay</i> , 10 songs, words & music complete, 34 p...	.35
ROMAJ ELEGIOJ & LA TAGLIBRO, <i>Goethe</i> ( <i>Kalocsay</i> ), amatory poems, 80 p..	.65
SVISA ANTOLOGIO, ed. <i>Bauer</i> , from 4 langs, top best anthology, BIG 540 p...	3.95
AMO EN LA JARO DEKMIL, <i>Elola</i> , novel, love's hidden power, 351 p.... Bound	1.25
ANSTATAŬA EDZINO, <i>Maxwell</i> , novel, love intrigue & escape, 212 p.... Bound	1.15
ALASKA STAFETO (& <i>Kaptitaj de la Glacirokoj</i> ), <i>Omelka</i> , excel, 96 p.... Cloth	1.15
GÖSTA BERLING, <i>Lagerlöf</i> , exciting famed Swedish classic, 552 p..... Cloth	3.50
LA MARVIRINETO, <i>Andersen's</i> fairy tale, deluxe illust LARGE, 78 big p. Cloth	2.40
LA VERDA RAKETO, <i>Forge</i> , 9 orig novels, some re Esperanto, 150 p.... Cloth	2.40
PORINFANA SERIO, 10 most beautiful illust. children's books, each 16 p.....	2.50
SET OF 20 RARE KEYS, unique large rare set of 20 different languages.....	3.00
YEARLY COLLECTIONS "AMERIKA ESPERANTISTO", complete, beginning 1944 to and including 1961 (except '48 and '59). Choose any 1 year, \$1.50; 3 or more years, ea. \$1.00; ALL 16 years complete since publication began, ea. 75¢ (only \$12 for ALL). Magazines shipped fr. EANA office, Portland....	12.00
ENAMEL GREEN STAR, Esperanto insignia — button, brooch or tie pin, each..	.50
INDIAN BEAD STAR, truly a real 'jewel', orig \$1, 1 1/4" dia, safety catch....	.85
ESPERANTO PENNANT, quality felt with Star & "Esperanto", 9" long 4" base	.30

**Esperanto Book Service, Williamsburg P.O. Box 315,  
Brooklyn, New York 11211**

## "SAY IT IN ESPERANTO"

by G. Alan and Doris T. Connor

*Tells You What to Say and How to Say it!*

You'll be delighted by the ease with which you'll immediately be saying whole phrases in Esperanto. Practice ordering meals, renting rooms, driving a car, going to a doctor, going shopping, etc., by using this handy manual.

5 1/4 x 3 1/2 in. for purse or pocket. Over 1000 phrases, many never before translated into Esperanto. A complete index with unique numbering system so that you find the phrase you want instantly. A quality product with strong covers and sewn back. A guide to conversation, with summary of grammar. Useful in Esperanto courses.

*It is a thoughtful, useful gift for friends, too!*

Those who receive it will find much interest in learning to say useful phrases in Esperanto; and will want to go on to a mastery of the interlanguage. Order them in quantity!

*Price only 75¢ each, discounts to groups & dealers.*

*Published by Dover Publications, Inc. Order from EANA.*



only  
75¢

## LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Ass'n of N.A.* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower—dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Ass'n of N.A.* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

*Esperanto Ass'n of N.A., 1837 N.E. 49 Ave., Portland 13, Ore.*